Raporto pri laborkunside de TKKE – estraro, kiu okazis
la 8-an de januaro 1956 en Olomouc.

Sub prezido de samideano Josef V í t e k , prezidanto de TKKE-ČSR / Tutŝata Konsulta Komitato Esperantista en ČSR, okazis posttagmeze la 8-en de januaro 1956 en Olomouc laborkunsido de TKKE-estraro.

Ĉeestit: gesamideanoj Josef Vítek, prezidanto de TKKE, Miloš Rudolf, sekretario de TKKE, profeoro J.Kožený, vicprezidanto kaj estro de organiza-sekcio, E.Tvarožek, prezidanto de Slovaka TKKE-sekcio. D-ro Vl.Mohapl, estro de TKKE preso, kaj estraranoj Evjáková, Matušová, Slaný, Lička, Vondroušek, Kořínek, por la Junularo s-ano Kočvara.
Kiel gasto partoprenis la laborkunsidon reprezentanto de Jugoslava Esperanto-Federacio s-ano Dobčnik Matko.

Rezultoj:
1/ fondiĝo d scienca de TKKE – estro s-ano D-ro Jermář;
2/ organiza sekcio / profsoro Kožný / preparos aliĝilon en UEA-n;
3/ La 41-an UK en Kopenhago partoprenos TKKE – delegacio kaj E-kultura delegacio;
4/ ĝisnunan duonoficialan organon „Nia-n Spegulo-n“ anstataŭigos „TKKE informas“
5/ Estis pritraktita la letero de Hungarlanda Esperanto-Konsulta-Komitato, en kiu proponas Hungarlandaj Esperantistoj organizi la II-an Danubvalan Esperanto-Konferencon en jaro 1956 somere en Bratislava /ČSR /. Laŭ decido de TKKE-estraro rekognoskos la aferon en Bratislava slovaka reprezentanto s-ano Tvarožek / Hviezdoslavova ul.2/III, Martin, ČSR/ kaj pri stingitaj rezultoj li informos TKKE-n.
TKKE-ČSR petas E-Asociojn en Hungarujo, Jugoslavio, Bulgario, Pollando kaj samideanojn en Rumanujo, ke ili pridiskutu la aferon, informu TKKE-ČSR / sekretario s-ano Miloš Rudolf, Wanklova 14, Olomouc / ĉu ili akceptus la proponon de HEKK kaj ke ili proponu konvenan daon por la konferenco.

\- x x x -

El referato de prezidanto de TKKE s-ano Vítek, al partoprenintoj de la Jubilea Laborkonferenco en Olomouc:
„Estis ĝuste viaj regionoj Olomouc kaj Ostrava, kiuj neniam ĉesis la funkciadon, sed kontraŭe servis kiel modeloj por la aliaj regionoj en la respubliko. Post la grava sukceso de Esperanto en UNESCO en decembro 1954 kaj la sekvonta fondo de TKKE en januaro 1955 en Olomouc ni faris, malgraŭ financaj malfacilaĵoj, dum la pasinta jaro gravajn paŝojn kaj novajn paŝojn ni preparas. Kun plena sento de respondeco mi diras: ..mi dubas, ke ekzistas iu alia lando, krom Jugoslavio, kie la E-movado estus tiel vaste praktikata, kiel en ČSR.. Post la traktado ĉe ministerio de kulturo ni povas promesi, ke estos restarigita EAČSR kaj estas nur demando de tempo, kiam denove ekfunkcios la Verda Stacio. Ni ne forgesu la laboron de la E-pacdefendantoj, sed ni memoru, ke ni estas nedividebla movado. Se iu Esperantisto ne volus pacan kunvivon, li certe ne estas Esperantisto. Ni faru ĉion, por ke la koncentrejoj kaj la militoj ne plu ekzistu!“